

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri omaĝo al Edmond Privat okazinta en Berno la 10-an de marto.

D-ro Arthur Baur jam raportis al vi dum elsendo pri la jarkunveno de la svisa esperantistaro. Dum tiu manifestacio, kiu okazis en Berno la 9an kaj 10-an de marto, la tuta dimanĉa posttagmezo estis dediĉita al prelegoj koncerne la vivon kaj agadon de nia granda samideano Edmond Privat.

Max-Henri Béguin, kuracisto en La Chaux-de-Fonds, parolis pri Edmond Privat, amiko de Gandhi, kvakero kaj pacisto. Eric Descoedres, la redaktoro de la semajna gazeto *Coopération*, prezentis poste la ĵurnaliston, verkiston kaj edukiston. La trian prelegon mi havis la honoron fari pri la esperantisto kaj mondanisto.

Vi certe estos kontentaj aŭdi kelkajn vortojn pri tiuj tri prelegoj, kiujn, ni esperas, aperigos esperanta revuo.

Max-Henri Béguin rememorigis, ke kiam Edmond Privat devis prelegi en Neuchâtel okaze de la morto de Gandhi, tiam li diris al sia aŭdantaro : « Mi estas kvazaŭ, kiel se mi estus ĵus perdinta mian patron ». Meditante pri la enhavo de liaj du verkoj *En Hindio kun Gandhi* kaj *Vivo de Gandhi* ni ne povas distingi, kion pensas Gandhi el tio, kion pensas Privat, tiel forte ambaŭ iliaj spiritoj unuiĝis.

La neperforto de la hinduismo estas parenca al tiu de la kvakero. Ambaŭ aŭskultis kaj fidelis tiun voĉeton, tiun internan lumon, kiu parolas al ni aŭ lumigas nin, se ni estas disponeblaj. Ambaŭ estis persvaditaj, ke en ĉiuj homoj troviĝas dia fajrero. Tio klarigas la valoron, kiu havis por ili ambaŭ ĉiu homa vivo. Kiam ili renkontis kontraŭulojn, ili ne konsideris ilin kiel malamikojn, kontraŭ kiuj necesas armiĝi por pretigi ilian pereigon, sed vidis en ili amikojn konvinkendajn. Perforto, malamo, kolero nur blokas, incitas kaj malbonigas la kontraŭulojn. Ambaŭ pensistoj multe agadis sur la politika tereno, sed ili ĉiam rifuzis ĉiun ajn kunlaboron kun la militspirito, kies celo estas mortigi homojn, do Dion.

Eric Descoedres prave diris pri Edmond Privat, ke li estis unu el tiuj maloftaj homoj, kies vivo perfekte akordiĝas kun la penso. Al tiuj, kiuj lin nur konis pere de liaj skribaĵoj, oni povas diri : « La homo, kies lucidan kaj fratan penson vi ŝatis, tiu homo vivis en harmonio kun sia penso. »

Li deziris helpi siajn fratojn, la aliajn homojn, en la serĉado de la vojo al la saĝo, al la feliĉo, al la lumo. Li agadis kiel edukisto, ne nur per sia instruado en lernejoj kaj universitatoj, sed per la verkado de miloj da artikoloj.

Relegi tiujn artikolojn kaj nombri la fakojn defenditajn de ilia aŭtoro, estas enorma sed interese laboro. Ni citu kelkajn ekzemplojn : dum la unua mondmilito li pledis favore al la sendependiĝo de Pollando. Li poste defendis Ligon de Nacioj kaj ĝian posteulon Unuiĝintaj Nacioj. Li diskonigis la principojn de mondfederalismo. Li atentigis pri la konstruiga laboro de neperfortemuloj kiel Gandhi, Danilo Dolĉi kaj Abato Pierre antaŭ ol ili estis famiĝintaj.

En la verkoj *Saĝo en Oriento* kaj *Vizio de juna virino* Edmond Privat konfidencas al ni siajn proprajn konvinkojn rilate la similecon, aŭ pli bone, la konverĝon de la grandaj religiaj doktrinoj, kiuj parolas pri la sama Dio sub malsamaj nomoj.

Du aliajn volumojn li dediĉis al Britujo kaj Usono. Tiuj volumoj de granda pensdenseco estas *La Angloj, de la piratoj al la profetoj* kaj *La usonanoj, de la koloniistoj al la pensistoj*. La aŭtoro mem klarigas siajn intencojn kaj la signifon de ambaŭ verkoj : « Skizon de la rolo de la spirito en la progreso de la angla kaj usona popoloj. La spirita potenco fiaskigas la leĝon

de la perforto. La unuiĝo de liberaj nacioj estas pli daŭropromesa grandeco, ol materia kaj nedaŭra imperio.

Ĉe la fino de sia vivo, dank'al la helpo de sia edzino, Edmond Privat redaktis siajn personajn rememorojn, kiujn tre baldaŭ aperigos la eldonejo Stafeto sub la titolo *Aventuroj de pioniro*. En tiu libro la esperantistaro trovos entuziasmigan aŭtobiografion, kiu lumigos multajn faktojn hodiaŭ iom legendajn. La aŭdantoj de Radio-Svislando havis la okazon jam aŭdi antaŭ unu jaro kelkajn el tiuj aventuroj de la juneco de nia samideano.

Dum la tria prelego mi prezentis kelkajn el tiuj aventuroj antaŭ ol entrepreni la analizon de la ĉefaj verkoj esperantlingvaj, kiel la tre konataj *Vivo de Zamenhof* kaj *Historio de la lingvo Esperanto*, kaj la bedaŭrinde malpli konataj *Esprimo de Sentoj en Esperanto* kaj *Interpopola Konduto*. Dum alia elsendo mi iam analizos por vi kelkajn elementojn el tiuj verkoj, kiuj asekuris, firmigis la laboron de Zamenhof, kies vivon kaj idealismon Edmond Privat diskonigis en Esperantujo. Nia samideano ne nur konstatis, ke nia lingvo vivigis novan mistikon, li partoprenis al ĝia formulado.

SinJORINO Yvonne Privat hodiaŭ laboras al la reeldono de la verkoj de sia edzo. Ni esperas, ke ŝi sukcesos. Dank'al ekspozicieto ni povis trafoliumi tiujn ankoraŭ ĉiam aktualegajn librojn, kaj tio incitis multajn ĉeestintojn ilin prunti ĉe bibliotekoj. Fotografajoj kaj manuskriptoj reliefigis tiun ekspozicieron, kiu multe interesis la esperantistaron.

Vi aŭdis prelegon el Svislando pri omaĝo al Edmond Privat. Parolis Claude Gacond. Se vi deziras scii, kie la tekstoj de la menciitaj prelegoj aperos, skribu al Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-